



PENSEO

N-ro 219

jan. / 2010

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 21-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Guozhu

Gratule al CRI

—okaze de la 45-jariĝa jubileo
de la E-elsendo
(2009-12-19)

Pri la unua sorĉ-momento
ĝis nun mi ankoraŭ memoras:
Kiel via voko sonoras
tra vasta ĉina firmamento

al oriento, okcidento!
Aŭdante mi pie adoras.
Pri la unua sorĉ-momento
ĝis nun mi ankoraŭ memoras.

Per diligento kaj talento
vi ĉiam fidele deĵoras.
Rekompenco inda valoras:
Kreskas impona monumento

ekde la unua momento.

Vejdo

Ĉe Sojlo de Tigra Jaro

Jam pasis la malnova jar'
kun plenespero venas nova.
Aspiras ni al sukceskova
afero verda sen kompar'.

Senĉese ni per ŝvita far'
laboru por elpaŝ' ekŝova.
Jam pasis la malnova jar'

kun plenespero venas nova.

Plenforte saltu ni trans bar'
de antaŭjuĝo laŭbontrova.
Reala ago ĉionpova
konkeros vermojn kun prepar'.

Jam pasis la malnova jar'.

Guozhu

Funebre pri S-ino Magdalena

La informo pri Magdalena
fulmtondre min batas dolore.
Falas la ĉielo horore!
En malĝojo dronas mi svena.

Ĉar impresas ĉiam serena
ŝi por La Gazeto labore.
La informo pri Magdalena
fulmtondre min batas dolore.

Kiel ofte ŝi per saĝplena
inspiro min helpis favore.
Funebras mi Guozhu adore
el Ĉinio kun koro bona

per rondelo pri Magdalena!
2009-12-01

Rimportreto

Magda Lena

Magda Lena el franca nordo,
kontribuas per <La Gazeto>,
kune kun EdZ en dueto---
paro en perfekta akordo.

Aranĝas ĉion en bonordo.
 Altiras nin kvazaŭ magneto.
 Magda Lena el franca nordo,
 mondon ligas per <La Gazeto>.

Duonjare for de la bordo,
 barke sen lig' al interreto,
 kunredaktas en kabineto,
 estiĝas mirinda rekordo.

Magda Lena el franca nordo.
 2008-04-02



Minosun

Pasero

en vintro enuiga
 pasero ŝvebas sola;
 por distro
 sur breton la fenestran
 ĝi flugas
 kaj legas
 legadon mian sub sunlumo.



Ĉineske

Anteo (Ĉinio)

Amoro

—laŭ ĉinesko yijiangnan*
 amoro,
 ĝuo dukora.
 oro ĝuigas viron,
 sed li karnofavora
 estas ostvora.

kaj amo,
 kuniĝo kora.
 tento ĝuigas inon
 sed ŝi spice fervora
 estas fetora.

*Yijiangnan (*Sopir-al-Sudo*): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima)

Mono

— laŭ ĉinesko deksessilabo*
 mon'
 al ĉiuj estas impon'.
 for de ĝi
 ne vivos demon'.
 di'
 superas homojn kun pi'.
 sed mono
 por ĉiuj ebri'.
 in'
 publike nudigas sin
 nur por ĝi;
 viro,kun spinklin'.
 mon'
 en ĉio estas impon'.
 etiko,
 ago por depon'.

*Deksissilabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Nomus Nimbus (Svislando)

Tutnudaj dum agado fi

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo
Ĉu,
ĉiam demandante plu,
atestant'
vidis vi nur du?

Ne,
mia vido estis tre
ege klara, sed
bedaŭrinde ne.

Mi
fakte vidis homojn tri
tutnudaj
dum agado fi

Atendovico por la pico

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo
vic',
senfina atendovic',
acidon
disas kun kapric'.

spic',
serpentume en helic',
alloge
venas el vertic'.

pic',
dum tempeta armistic',
atendo
finis laŭ indic'.



Lily (Ĉinio)

Erupto Fontana

—laŭ ĉinesko Fengrusong*
trempas en kuvo bana
senakompana
viro sin konsolas per
rigida
kac' banana
li ĝemkrias base
kun son' spontana

en akvo diafana
moviĝo mana
ekkirlas sapajn ŝaŭmojn
lia klopod' senvana
vere kondukas al
erupto fontana

**Fengrusong (Vento inter Pinoj): ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun 7 kaj 6 versoj respektive de 7,5,734,66 / 7,5,77,66 silaboj, laŭ rimarango a,a,xxa,xa / a,a,xa,xa (x=senrima)*

Cindy (Usono)

Erupto skandala

—laŭ ĉinesko Fengrusong
Li vipas uragane
tiras membrane
ve, bananta viro vi
vundkriojn
dampas vane
la najbaroj aŭdas
kaj ridas rikane

ho, li vundis sin glane
kantis soprane
pro banano tro mola!
sapumu vin subkrane
bananta banano
vi forvelkus bane

